

# Tagiĝo 36

1957/X Cirkulero de Esperanto Junularo en ĈSR N-ro 36

Eldonas: Dům Osvěty P. Bezruč v Opavě/Domo de Kulturo  
Petr Bezruč en Opava. - Redaktas: Jaroslav Mařík, Malá  
Štěpánská 9, Praha 2 – Nové Město, Ĉeĥoslovakio

SOMERAJ STUD-TENDAROJ EN ĈSR 1957 .

(Popelná — Koněšín - Alta Tatra.)

En la loko Popelná, bela angulo de la Ŝumava-montaro, okazis 14.- 28.VII. la VI-a Somera Esperantista Tendaro de la ĉeĥoslovaka esperantista Junularo. Ĝi estis aranĝita nunjare de la Esperanto-Rondeto ĉe ZK Jitex en Písek sub oferema gvidada de ges-anoj Křivánek kaj de s-ano F. Nymburský, tendarestro, por iam pli ol 100 junaj homoj el ĈSR, Jugoslavio kaj Svedlanda. Oni studis en 7 kursoj de 4 kategorioj (2 A, 3 B, 1 C, 1 D) la gramatikan, historian kaj literaturon de Esperanto. Instruis Echtner, Franc, Hořejší, Koříňková, Lorková, Mařík, Novobilský, Novotný, Podhradská, Slivka, Valjan. Post la kursoj sekvis distra kaj kultura programo, plej ofte sub la gvido de V. Novobilský, kelkfoje ĉirkaŭ la tendara fajro. Digne estis rememorita la 70-jara jubileo de Esperanto. Tre bonan nivelon de scioj pruvis la finaj ekzamenoj, kiujn sekvis disdono de bele presitaj esperantlingvaj stud-atestoj. La junularo posedas ne nur manlibron pri la historio de la Esperanto-movado, sed nun ankaŭ ĝisdatan lernolibron de Novobilský pri ĝia literaturo, verkitan por la, studceloj en SET. Ekzamenitaj estis 71 personoj, el kiuj 35 kun prospero eminenta, 31 tre bona, 5 bona. Post prijuĝo oni konstatis, ke la plej bona lernanto en ĉiu kurso estis... ino.

La SET en Popelná estis ĝis nun la plej granda, laŭ la nombro de partoprenantoj, grandurbo kun preskaŭ 60 tendoj, ĉiu kun matracloj. La SET-anoj venis el ĉiuj partoj de ĈSR inter Plzeň kaj Košice kaj irter Ústí n.L. - Krnov norde kaj Ĉ. Budějovice kaj Bratislava sude. Gravan plivigligon de esperanta konversacio kaŭzis la ĉeesto de agrablaj gastoj el Jugoslavio (gestudentoj Olivera, Jika kaj Saša el Beogrado kaj nevidanto Nikola el Zemun, krom dutaga vizito de instruisto el Beogrado) kaj el Svedlando (de la granda SET-amiko ing. G.Nilsson el Stokholmo, kiu venis nur por povi frekventi kiel lernanto la D-kursaron). - Krom la ŝtata flago sur masto granda verda flago flirtis sur alta gardoturo. La klasoj troviĝis plejparte sur herbejo, ekipita per spertaj establaĵoj kaj kampaj

seĝetoj. Kampa telefono interkomunikigis la tendaron kun la kuirejo kaj manĝejo, kiuj troviĝis ĉ.500 m ekstere en masonita domo. Tie ankaŭ okazis la lecionoj kaj vesperaj kulturprogramoj, kiam la vetero ne favoris nin. Tre ofte pluvis, sed tia ne multe influis la bonan humoron de la SET-anoj. Krom ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo (Kašperské Hory, kastelo Kašperk, monto Popelná hora) oni vizitis per aŭtobuso i.a. la riveron Vydra, Kvilda, la praarbaron Boubín, Volary, Prachatice, Husinec kun la naskiĝdoo de Jan Hus. En la malnova Prachatice la nomoj de niaj eksterlandanoj estis skribitaj en la urban kronikon, laŭ peto de la urba arkivistino. - Ĝojigis nin vizitoj de s-anoj eĉ el maproksimaj lokoj (gefratoj Solnický k. a. el Opava kaj la tuta familio Šustr el Praha). - La Tendaro komune kun la junulara sekcio de TKKE sendis salutojn i.a. al la internacia kunveno de TEJO en Francio kaj al la VI-a Tutmonda Festivalo Junulara en Moskva. - Laŭ la akiritaj spertoj ni povas rekomendi: a/ ne aranĝi tendaron kun tiom da partoprenantoj, b) la aĝolimoj estu inter (proks.) 14-15 kaj 30 jaroj.

La Someran Esperanto-Tendaron en KONĚŠÍN aranĝis 4-17/VIII, la Esperanto-Rondeta de Domo de Kulturo en Třebíč kaj partoprenis ĝin 21 gesamideanoj. Inter ili estis Dieter Berndt (Ĉenda) el GDR kaj Andor Laczko, reprezentanto de la hungara junularo. Instruis Th. Kilian, V.Echtner kaj juna blinda s-ano J.Vychodil el Praha. Pri la bona sukceso de la aranĝo meritas la organiza laboro de s-anoj Jariš-Habeš, Čermák, Danhelová, Kilian kaj gefratoj Poláček.

En SLOVAKIO komenciĝis 13-VII. 10-taga junulara stud-tendaro apud Štrba, sub la montegaro ALTA TATRA, organizita precipe de ing. Milan Zvara. Prelegoj pri elektitaj gramatikaj partoj de Esperanto, pri propagando kaj defendo de Esperanto. Partoprenis 8 gejunuloj de sub Alta Tatra, kaj el Bratislava. Pro pluvoj (komunaj al ĉiuj SET) la tendaro translokiĝis al kabano ap. Vernár. Venontjare oni renkontiĝos en pli granda kvanto kaj kun pli bone preparita programo.  
/M.Zv./

KUNVENON DE LOKAJ JUNULARAJ REPRESENTANTOJ, kiu okazis 22-VII, en la kadro de SET en Popelná, partoprenis 36 invititoj el 18 lokoj de ĈSR (Praha, Havířov, Milevsko, Písek, Ostrava, Pardubice, Bratislava, Košice, Ĉ. Budějovice, Strakonice, Netolice, Opava, Plzeň, Brno, Nová Paka, Krnov, Rýmařov, Poprad) kaj jugosl. gastoj el Beograd kaj Zemun. Oni aŭdis raportojn el ĉiuj lokoj kaj pritraktis aktualajn problemojn de la movado. Laŭ Slivka en Slovakio povus okazi en 1958 SET par 50 homoj. Dr. Kočvara rakontis pri sia vojaĝo en Pollando kaj V. Echtner rememoris la sepdekjarigon de Esperanto. Li estas per internacia SET 1958 en Slovakio.

ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO estis starigita per dekreto de la ministerio por lernejoj kaj kulturo kun la data 15.10. La agado de TKKE estis samtempe ĉesigita. ĈEK direktos la tutŝtatajn aferojn, en Slovakio funkcios Slovaka E-Komitato. Adreso de ĈEK: ĉe Osvětový ústav, Praha 12, Blanická 4. - Ni salutas la starigon de ĈEK kiel plenumon de petskribo de TKKE. - Kiel prezidanto de la Komitato estis nomita A. Malík.

La tradicion INTERBABILADON en OSTRAVA 26-28/10. partoprenis ĉ. 100 personoj el Bohemio, Moravio kaj Slovakio. Laŭ la organiza vidpunkto ĝi impresis altnivele. La deĵorado modele funkciis (L. Adámek). La tagordo permesis al ni viziti komune kelkajn urbokvartalojn de Ostrava. La aranĝon antaŭiris unusemajna esp. seminario. Ĝia sabata prelego de s. Janouš Bildoserio el Japanujo - Atombombo kaj ties konsekvencoj konvinke parolis pri nia supera devizo: pormonda paco. - Dimanĉe estis pridiskutata tre vigle la nova organiza formo de la ĉsl. movado. La starigo de Ĉsl. E-Komitato estis ĝoje salutata, sed samtempe oni rezoluciis rekomendi al la ministerio nomi alian personon kiel prezidanton de ĈEK. Sekvis diskuto pri kulturaj aranĝoj (renovigo de konkursoj), kiuj povus esti daŭrigataj en gazetoj. - La ĉefa kulturprogramo okazis vespere. Pluraj trupoj paradis surscene.

Onin mirigis sprita estrado; same estis pri la prononco. Lunde prelegis Slaný (30 jarojn en E-movado). La junularo dume diskutis utildone en Laborkunveno, dividita en tri sekciojn: 1. Kursoj en lernejoj (Kočvara, Schwetter), 2. Taskoj de nia ekzamena komisiono (Werner), 3. Someraj tendaroj (Novobilský, Kuzník). Rezultoj i.a. .: propono de la kunveno nuligi la A-kursojn en SET kaj starigi centran organizadon de la tendaroj. (Ĉu antaŭe balotigi la publikon pri tio? - rim.de raportanto). Por la elementaj kursoj en lernejoj k. s. helpos instrubildoj de Draĥ.Kočvara (multobligitaj), paralelaj instruiloj de la Kilian-lernolibro. - La ekzamena komisiono sin dediĉis al esploro por trovi novajn kapablulojn pri instruservo. Kredeble estiĝos aparta kurso aŭ rondeto E por frekventintoj de la D-kursoj (Z.Rusín). Ni atendas kompilon de gramatikaj tekstoj (proponis Novobilský). Viglaj diskutoj kaj eĉ disputoj montris, ke la laboro de la junularo iras celkonscie antaŭen. --- O.Kn.

INTERNACIA ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN MOSKVO 9-10/VIII. 1957 estis oficiala programero de la VI-A Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj por Paco kaj Amikeco. La salono de la Centra Ŝakista Klubo ne povis enteni ĉiujn interesatojn kaj do envenis la invititoj (160), kiuj ricevis de la Esp-ista Festivala Komitato bele presitajn invitilojn en kolora koverto kun eldonita Himno de l'demokrata junularo en Esp-o. El ĈSR partoprenis k-do Mil. Jíra el Jablonec n.N., el Bulg. 2, delegito j, el Poll. 2, el Hung. 2 plus 5 gastoj. Reprezentitaj estis Aŭstrio, Bulg., ĈSR, Hung., Poll., Francio, Svedl., Norveg, Danl., Svisl, Hisp., Italio, Nederl., Germ, F.R, Maroko, Ĉina P.R., Japanio, Vietnamo kaj USSR (ĉ.100 deleg.). Al la renkontiĝo ne venis esp-istaj festivalanoj el Brazilo, Finl., Islando, Bolivio, Belg., Jugosl., Anglio, kiuj tamen ĉeestis en

Moskva. --- La Renkontiĝon malfermis kaj salutis verkisto k-do Sergejev kaj akcentis, ke Esp-o estas bona ilo por firmigi la pacon. En la ĉefa parolado, Rolo de E. en proksimigo de popoloj kaj en lukto por paco, N. Nikolov (Sofio) montris i.a. la manierojn, per kiuj la esp-istoj laboras en tiu senco. Li ankaŭ menciis tre favore la sukcesojn de la ĉeĥosl. junaj esp-istoj kaj de iliaj someraj tendaroj. - La diskutadon partoprenis preskaŭ ĉiuj landoj (i.a. pri Juna, Vivo, mallutila agado de SAT-anoj, batalo por paco, kosmopolitismo, lingvaj malfacilaĵoj en neesp. kongresoj) kaj oni raportis pri la stato en diversaj landoj. Kortuŝa estis kontribuo de japanino Jukiko Nakano pri japana batalo kontraŭ milito. M. Jira parolis pri la movado en ĈSR, pri iniciatemo de junularaj grupoj, pri perspektivoj de la movado kaj pri la devo de la junaj esp-istoj disponigi ĉiujn fortojn kaj lingvosociojn al interproksimiĝo de la popoloj. Kelkaj delegitaroj disdonis donacojn, ekz. la soveta; la hungara en la nomo de HEK vazojn kaj esp. broŝurojn, la japana belan presitan broŝuron de japanaj studentoj. La kunvenon salutis k-dino Majtinskaja en la nomo de la Lingvosciencia Instituto en Moskvo kaj UEA pere de la dana delegito. --- La Renkontiĝo fine akceptis unuaanime rezolucion kaj alvokon al la esperantistoj en la mondo. (Ilian tekston ellaboris komune delegitoj sovetaj, bulgaraj, francaj kaj okcidentgermanaj). -- En la kadro de la Renkontiĝo estis aranĝitaj Esp.-ekspozicio, projekciado de esp-lingva filmo el Hung. kaj de japana pri Hiroŝima, bela ŝippromeno aparte por la esp-istoj kaj fine amuzo kun koncerto kaj danco. - La soveta televido filmis parton de la renkontiĝo.

(koncize laŭ M. Jira)

B e l a f l o r v a z o kun esp-lingva teksto kaj informaj kajeroj pri la hungara esp. junularo estis donacitaj de la Hungarl. E-Konsilantaro al la ĉsl. esp. junularo. S-ano Jira alportis ilin el Moskva el la manoj de la hung. delegito I. Ferenczy. - K o r a n d a n k o n ! - Mladá fronta en sufiĉe longa artikolo raportis 11.8. sur 1-a paĝo pri la Renkontiĝo.

FESTVESPERON POR HONORIGI LA 40-AN DATREVENON DE LA GRANDA OKTOBRA SOCIALISTA REVOLUCIO aranĝos la Esp.Klubo en Praha 2, Smečky 26 sabate 9-an de novembro je 19 h: festparolado, muziko, kantoj, dramero, recitado.

#### EL LA VIVO DE LA JUNULARAJ GRUPOJ

LITVÍNŮV: la grupo kunvenas merkr. en Stalinovy závody; bona programo, murgazeto. La uzina klubo estas tre favora al ĝi.-- PODĚBRADY: vigla aktiveco, varbagado en ĉiuj lernejoj. De septembro du kursoj, murgazeto en lernejo. 30.6. okazis regiona kunveno komune kun Ml. Boleslav: eldonita, rezolucio alvokas al intensigo de varbado, ĝisfunda, ellerno de la lingvo, partopreno en la movado, kontaktado kun naciaj komitatoj, organizaĵoj, kulturinstitucioj, kaj al aranĝado de esp. ekspozicioj. - NETOLICE: komencula grupo.- PÍSEK: sukcese aranĝis SET en Popelná. Nova kurso de 1.X.- PRAHA: rekunvenas de sept. en Krakovská 21, marde, preparas nikol.vesperon je 30.11. Altlernejoj Zabadalová, Kníchál, Novobilský per prop. murpaneloj vekis intereson de studentoj. --PLZEŇ: Rekunvenado de 3.9., 17 ĉeestantoj. Nova komitato: reg. delegito Jos. Sladký, Holýšov, LD Věra Kulíšková, LD en Chotěšov: Ant. Valta. Kursoj A, B, C-D preparitaj. Plzeň kunvenas marde en Český dvůr, Palack. nám. por la programo: kontrolo de taskoj, organizaj problemoj, nova kanto, lernoparto, ludoj, konversacio, RD Sladký eldonis en okt. la 1-an n-ron de JUNA ESPERANTTISTO, el kiu alvenas nova, freŝa vento de la aktiveco en la regiono, kion ni vidas el la skizita programo kaj lokaj raportoj. S-ano Sladký persistu! En la regiono estas 23 junularanoj: Plzeň 15, P-venkov 1, Chotěšov 5, Nýřany 1, Holýšov 1. En n.e. Arma, Plzeň, propag. montrofenestro instalita. - CHTĚŠOV: la propagadon prizorgas Ignác kaj Štefan Levák. Post kurso fondita, esp. rondeto ĉe ĈSM kun 6 anoj, kunvenoj lunde. Preskaŭ ĉiuj partoprenis SET Popelná. Grupestro: Ant. Valta, Chotěšov 220. --- PARDUBICE: en junio 7 anoj ekzameniĝis en B-kurso. S-ano Štechr peris kontakton de loka lernejo kun lernejoj en 3 landoj kaj vekis grandan intereson de la lernejo. En sept. komenciĝis nova elementa kurso. 6 anoj estis en SET-oj. Esp. renkontiĝon 25.8. sur monto Kunětická hora partoprenis 43 ges-anoj el 20 lokoj de ĈSR kaj norvega ĵurnalisto O. Thormedser, kiu rakontis pri sia lando, M. Jira (Jablonec) pri la moskva festivalo, V. Echtner pri

Univ. Kongreso en Marseille. Thormodsen kun esp-istoj vizitis la, urbestron de Pardubice por 2-hora amika interparolo. - LIBEREC: tre sukcesintan ekskurson en junio al Malá Skála partoprenis 30 esp-istoj el lokoj de la orienta Bohemio. - LITOMYŠL: ekzistas kelkaj esp-istoj, sed rondeto ankoraŭ ne fondita. - KNAPOVEC: aktiva izolulo serĉas kunlaboron en la ĉirkaŭaĵo. (Lia nomo?).- CHRUDIM: studrondeto kun 3 anoj ĉe Osvět. beseda; en junio ili submetis sin al A-ekzameno. De oktobro nova elem. kurso. - OSTRAVA: La esp. junularo ĉe la uzina klubo de la ferfabrikoj VŽKG: 4 kursoj (2 A, 1 B, 1 C) komencitaj 18.9. Instruas Slaný, Draž. Kočvara kaj Vlast. Kočvara, ing. Werner. 4 anoj partoprenis SET en Popelná. La tuta klubo partoprenis la preparon de Interbabilado (v.pĝ.2). En sept. oni preparis la starton de novaj kursoj por lernejoj: en Ostrava-Vítkovice en 2 lernejoj (gvidas Slaný), en Jakartovice (lernejestro Hadámek), en Budišov nad Bud. (Prašivková), en Prostřed.Suchá (Schwetter), en metilernejo de VŽKG-Ostrava-Hrabůvka (D.Kočvara), en metilernejo Spoj.účňov. škola en Vratimov (Basl), en ministlernejo en Havířov (Šlechta). -

ESPERANTA SEMINARIO EN OSTRAVA: la serion de kvar prelegoj, prezentitaj 25.-30.10., preparis junularanoj ing. J. Werner, Draž. Kočvara kaj L.Adámek. La kvinan prelegon prezentis s-ano Slaný.

HAVÍŘOV: la rondeto kunvenas ĵaŭde 20 h. en la domo de la Nacia Komit.- INTERNACIA GIMNASTIKA KONKURSO. Post la tre sukcesinta pasintjara konkurso inter lernejoj de diversaj landoj la nunjara partoprenis 6 lernejoj (2 en Britujo, 2 en Germanujo kaj 2 en ĈSR). En ambaŭ kategorioj, individua kaj grupa, venkis Britujo. Organizis ĝin denove s-ano O.Schwetter en Havířov.

Regioj BRNO-JIHLAVA: ne venis raporto (aŭ ĝi perdiĝis?).

-----00000-----

SKIZO PRI LA ESPERANTA LITERATURO estas la titolo de libro, kiu ĝis nun estas unika en la Esp.-movado. Ĝi redonas la historion de la Esperanta literaturo ĝis la lastjara stato. En ĝi defilas ĉiuj menciindaj verkistoj kaj iliaj verkoj. La verko estas ne nur lernolibro por pli altgradaj kursoj, sed ankaŭ ne malhavebla fonto de sciindaĵoj por ĉiu, kiu volas esti klera esperantisto. Ĝi enhavas i.a. ankaŭ traktaton pri la Esperanta metriko kaj liston de neologismoj kun ĉeĥa traduko.

Aŭtoro estas nia junulara kultur-delegito Vlastimil Novobilský. - La libro, 20x14 cm, 74 paĝoj, estas eldonita de la E-Junularo ĉe Domo de Kulturo en Opava, kartonita ĝi kostas Kčs 20, -. Mendu tuj ĉe J. Kuzník, Mendlova 21, Opava. La verko estas deviga studilo por la C- kaj D-kategorioj en SET.

UNUA LEGAĴO estas nova verketo, kompilita de Julie Šupichová. Ĝi enhavas fragmentojn el diversaj verkoj (ankaŭ el la "Avinjo" de B. Němcová), poemojn, anekdotojn ktp. Nepre taŭga legaĵo por frekventintoj de kursoj. Mendebla por Kčs 5,50 aŭ frankite ĉe J. Šustr, Dlouhá 10, Praha 1 - St. m.

KANTARETO. Belespektan junularan esp. kantareton, daŭre kompletigeblan per novaj kantoj, mendu tuj ĉe s-anino Bartovská, n. p. Slezan, Místek. La kantareto enhavas jam: Espero, Ni, esp. junularo, Himno de demok. junularo, Maryša, Dnjepr, Luno k. a. Folioj kun novaj kantoj zorge aranĝitaj estas eldonitaj interesatoj ilin ricevados sinsekve. Prezo ĉ. 4 (daŭrigo sur pĝ. 6)